

portempe, de kelkaj kemiaĵoj, sed kreskaĵoj, kiuj apartenas al aliaj specoj, tute ne influigas. Ŝajnas apenaŭ kredeble, ke ia ĝenerala ĉiokuracilo eltroviĝos, tamen ekzistas pluraj faktoj, pri kiuj oni povas kredi, ke ili favoras tian esperon.

Plue, kiam oni aplikas tiujn substancojn al purarasaj musoj, kiuj spontanee tendencas havi tumorojn apartenantajn al kelkaj specialaj specoj, ili estigas tiajn tumorojn frue kaj multnombre. Ŝajne la ŝanĝo per kiu normalaj ĉeloj fariĝas tumoraj ĉeloj, estas esence la sama por ĉiuspecaj tumoroj, ĉu ili estiĝas nature aŭ eksperimente. Ĉar sciencistoj nuntempe posedas substancojn, kiuj estigas tian ŝanĝon, kia ajn estas la naturo de la koncerna ĉelo, oni povas permesi al si supozi, ke ia egale ampleksa rimedo eltroviĝos por kontraŭi al tumorĉeloj ĝenerale, agante laŭ la principo, kiu troviĝas ĉe ĉiuj. Sed tio restas ebleco por la estonteco.

LETERO EL KOREUJO.

408.92(519) „195”

Prof. Hengwi Hong
Chunggu-Universitato
Taegu, Koreujo.

Taegu, la 29-an de Aŭgusto 1952.

Scienca Revuo
Internacia Scienca Asocio Esperantista
J. Muusses, Purmerend, Nederlando.

Kore estimataj samideanoj,

Antaŭ ĉio mi elkore dankas vin pro tio, ke vi ĉiam sindoneme klopodas por nia komuna afero, kio celas al plia feliĉo de la tuta homaro, per la eldono de via organo kaj legindaj libroj Esperantaj. Kaj mi petas vian grandaniman pardonon pro tio, ke mi nenion povis kontribui al nia monda movado pro malfavora cirkonstanco en tiu ĉi lando, en kiu mi restadas, precipe de post la eksplodo de la malbenita milito, kaj mi estas devigita peti vian samideanan helpon por nia movado en tiu ĉi malfeliĉa lando.

Verdirite jam de longe mi deziris aboni vian organon kaj aĉeti de vi eldonitajn librojn legindajn ne nur por mi mem, sed ankaŭ por multaj studentoj, kiuj de mi lernas esperanton kaj malsatas je legajoj, sed la deziro ĉiam restis nur deziro. Ĉar al ni koreaj esperantistoj mankas la rimedo sendi monon alilanden, kaj la cirkonstancoj en tiu ĉi milite ruinigita lando ne permesas al ni eldoni eĉ nian propran organon, per kiu ni povus kontakti kun monda movado. Pro tia situacio nia movado en tiu ĉi lando estas devigita esti tute izolita for de la monda movado.

Permesu min resume informi vin pri nia movado en tiu ĉi lando. De post la fino de la dua mondmilito ĝis tuj ankaŭ la eksplodo de la milito ni koreaj esperantistoj kun esperplena entuziasmo klopodis por disvastigi nian movadon inter la popoloj, kiuj aspiris plej baldaŭan sensangan tutlandan unuiĝon, pli pacan sociordon. Ni propagandis al ili nian aferon per ĵurnaloj, radio, paroladoj kaj aranĝis kursojn: kvankam la tragedia paralela linio limigis

nian agadon nur en sudo de la linio, tamen la rezulto estis ne malgranda. La interesiĝo de la homoj pri nia movado, pli kaj pli grandiĝis, multaj el ili konsideris esperanto-instruadon tre necesa por tia nova lando, kia estas Koreujo. Ni povis enmeti esperanton en ne malmultajn universitatojn kaj gimnaziojn kiel devigan aŭ liberan temon; pli kaj pli multiĝis novaj fervoraj samideanoj. La eduka ministerio decidis oficiale rekomendi esperanto-instruadon al ĉiuj universitatoj en la komenco de Junio 1950. Ni plenesperis, ke la oficiala rekomendo akiros sukcesan rezulton por nia movado.

Sed la realo estis tro kruela al ni. En la tagiĝo de la 25-a de Junio 1950 eksplodis la kruela milito, kiu forrabis la rezulton de nia kelkjara penado kaj murdis niajn multajn karajn kunlaborantojn aktivajn.

La krueleco de la milito en Koreujo estas apenaŭ imagebla por tiuj, kiuj ne povis rigardi la mizeron de la popoloj per siaj propraj okuloj.

La milito forrabas de la homo homecon, racion, posedaĵon, vivon, ĉion, kion la homo havas, kaj donas al ĉiuj nur kruelecon kaj mizerecon. Sur la milite dezertigita lando nenion posedantaj vivrestantoj baraktas en malspero, kaj malmultaj potencavidantoj elperfortas al senkulpuloj senkore buĉadi senkulpulojn. Kion fari en tia infera situacio?

Nia movado ankaŭ estis tute sufokita kun ĉiaj aliaj kulturaj movadoj dum la plej terura tempo.

De Marto 1951 mi kun transvivintaj samideanoj en Taegu kaj en Pusan klopodis por restarigi nian movadon, kiu dum iom da tempo ne povis funkcii pro la terureco de la milito. Por la oficejo de Korea Esperanto-Instituto, kiu antaŭ la milito sin trovis en Seoul, ni luis unu malgrandan ĉambron en Chunggu-universitato.

De Aprilo 1951 mi rekomencis instrui Esperanton kiel devigan lecionon de Chunggu-universitato kaj Taegu-universitato, kiuj ĝis tiam estis devigitaj ĉesigi lecionojn pro la milito. En la komenco la nombro de la studentoj, kiuj lernis Esperanton ĉe la du universitatoj estis ĉirkaŭ 200; la nombro pli kaj pli multiĝinte nun nombras ĉirkaŭ 300.

La 15-an de Julio de nuna jaro fervoraj studentoj en Taegu kaj el Pusan havis fondkunsidon de Korea Studenta Esperanto-Societo ĉe Chunggu-universitato. La provizora oficejo de la Societo sidas ĉe Chunggu-universitato.

Kiel mi jam diris, la nombro de studentoj, kiuj lernas Esperanton nuntempe nombras ĉirkaŭ 300, sed mi devas verdir, ke multaj el ili lernas ĝin nur pro la devigeĉo de leciono en la universitatoj precipe pro tio, ke en la universitataj bibliotekoj ne troviĝas legindaj esperanto-libroj, kaj ili de post la milito ĝis nun ne povis trovi eĉ unu esperantiston el multaj alilandanoj, kiuj post la milito torente alvenis al nia lando nur por la milito.

Por pli fervorigi studentojn al nia movado mi devas doni al ili legindajn Esperanto-librojn, ĉar ili deziras pli multon scii per ellerno de fremdaj lingvoj; tia deziro, mi opinias, ne estas riproĉebla.

Pro tia aktualeco mi deziris kaj intencis pli multigi Esperanto-librojn en nia universitata biblioteko, sed la deziron kaj intencon ĉiam nuligis la manko

de rimedo sendi monon alilanden. Por solvi la mankon mi fine intencis eldoni Esperanto-librojn, ŝanĝeblajn kontraŭ alilandaj libroj, sed por eldoni novajojn mankas presliteroj esperantaj kaj kapablaj kompostistoj en tiu ĉi milite ruinigita lando. Pro tio mi estis devigita por la eldono elekti nur tion, kion oni kapablas fotografe represii sen kompostado. Kaj lastatempe mi represeldonis per la elspezo de la universitato la tekston de *Tra la Jaro*, kies represmeson ni akiris pere de usona samideano, s-ro A. C. Blatt, kiu en la pasinteco estis kun ni en nia lando dum unu kaj duona jaro. Ĝi servos por komencantoj el miaj studentoj kaj por interŝanĝe akiri alilandajn librojn. Kvankam mi ĉiel klopodis por altkvalite eldoni ĝin kiel en aliaj landoj, tamen la rezulto perfidis mian deziron pro la manko de bonaj presmaŝino, inko, papero kaj tekniko en tiu ĉi lando. Kvankam multe malpli bone farita ol la Londona eldono, tamen ĝi estas unuagrade farita post la milito en nia lando, mi konsciencie diras al vi, kaj mi kuraĝas ĝeni vin petante vian samideanecan helpon por nia movado en tiu ĉi malfavorata lando.

Mi kore deziras, ke vi bonvolos klopodi per anonco aŭ recenzo en via organo por ke multaj el viaj legantoj bonvolu interŝanĝi siajn librojn kun la represaĵo por ke ni povu per la represaĵo multigi Esperanto-librojn en la universitata biblioteko; ĉar mi deziras per sukcesa rezulto de via faro ne nur kontentigi studentojn, sed konstatiĝi al profesoroj ankoraŭ skeptikemaj pri la utileco de Esperanto, la universaleco de Esperanto.

Mi, reprezentante koreajn Esperantistojn, plej samideane salutas al viaj ŝatataj legantoj.

Ĉiam sincere via Hengwi Hong.

ISAE-INFOJMOJ.

061.22 I.S.A.E.

Membrokotizo por 1953 estas por aktiva membro 12 anglaj ŝilingoj (abono de Scienca Revuo enkalkulita). Tio en diversaj valutoj egalas al: Argentino 25 peso, Aŭstrujo 35 ŝilingoj, Belgujo 85 frankoj, Brazilo 30 kruzejoj, Bulgarujo 500 levoj, Ĉeĥoslovakio 85 kronoj, Danujo 12 kronoj, Finnlando 400 markoj, Francujo specialaj kotizoj, Germanujo 7 markoj, Hispanujo 60 pesetoj, Italujo 1000 liroj, Japanujo 600 jenoj, Jugoslavio 500 dinaroj, Meksikio 14 peso, Nederlando specialaj kotizoj, Norvegujo 12 kronoj, Polujo 7 zlotoj, Svedujo 9 kronoj, Svisujo 7.50 kronoj, Usono 2 dolaroj. Bonvolu pagi tuj al la delegito.

Elektio de Komitato. La alvoko en la antaŭa numero pri elekto de komitatanoj estis publikigita tro malfrue. Nun ni devis lasi al la malnovaj komitatanoj elekti estraron por 1953. Tiu elekto estos preta la 1 marto 1953. Por krei novan komitaton por la periodo 1953-1955 (po 1 komitatano en ĉiu lando kaj po 2 komitatanoj por la sekcioj en Britujo, Francujo kaj Nederlando) ni petas la membrojn voĉdoni per letero al la delegito en 1 monato post apero de tiu ĉi alvoko.

La norvegaj membroj jam elektis s-ron C. Støp-Bowitz komitatano.

Terminologia sekcio. La estraro de ISAE decidis fondi Terminologian sekcion de ISAE. Provizora adreso: S-ro S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 nb, JOHANNESHOV, Svedujo. Ni vokas ĉiujn interesitajn fakulojn al kunlaboro. Anoncu vin membro de la sekcio!

En Italujo estas fondita Itala Scienca Klubo Esperantista. Adreso de la sekretario: S-ro P. Marelli, piazza Napoli 40, MILANO. La sekretario informis ke oni intencas eldoni terminarojn en formo de apartaj folioj por ĉiu fako kun la lingvoj esperanto — itala — angla — germana — franca. Oni komencos per terminaroj pri mekaniko (ilmaŝinoj ktp.).

En grava itala teknika revuo *Macchine* aperis artikolo de s-ro Marelli kun titolo *I dizionari tecnici*.

Nova adreso de la germana delegito: D-ro C. Dellian, Haus-Nr. 152, (13a) KELHEIM-OST, Germanujo okcidenta.

Saluto el UEA. „Kiel Estrarano por Fakaj Asocioj mi sendas korajn salutojn de U.E.A.-Estraro, kun espero ke la venonta jaro alportos grandan sukceson al via ŝatata Asocio. Sincere via David Kennedy”.

Estraro de ISAE 1952. La Komitato de ISAE elektis estraron kaj revizorojn por 1953 kun jena rezulto: prez. M. Fréchet (Francujo); vicprez. C. Stop-Bowitz (Norvegujo) kaj G. F. Makkink (Nederl.); ĝen. sekr. E. D. Durrant (Britujo); sekr.-kasisto S. Alexandersson (Svedujo); anstataŭantoj H. Sirk (Aŭstrujo) kaj M. J. de Lange (Nederlando); revizoroj K. Young kaj A. A. M. Whitehead (Britujo).

S-roj de Lange kaj Young, tamen, sciigis ke ili ne povas akcepti postenojn.

La jarkunveno de ISAE okazos en la kadro de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, Jugoslavio, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1953. Tagordo laŭ la statuto. Proponoj pri ceteraj demandoj pri-traktotaj oni sendu al nia sekretario aŭ al sinjoro M. Gjivoje, Vodnikova 19/II, Zagreb I, Jugoslavio. S-ro Gjivoje, kiu estas komitatano de ISAE, aranĝos la kunvenon por ni.

Sven Alexandersson.

LA FONETIKA EKSPERIMENTO DE RADIO ROMA

de W. P. ROELOFS, Nederlando.

414
003.62 : 411.5
409.35 : 654.16 : 656.7

Mi tre kore dankas unuavice al Radio Roma pro ĝia granda komplezo aranĝi la eksperimenton laŭ mia peto kaj organizi ĝin tiel perfekte, kaj dua-vice al ĉiuj aŭskultintoj kiuj bonvolis sendi raportojn, eĉ se ili povis raporti nenion alian ol tion, ke ili sukcesis kapti tute neniom de la disaŭdigo.

Bedaŭrinde kelkaj ne bone komprenis. Kelkaj ja aŭskultis, efektive ion aŭdis, eĉ notis, kaj ne sendis la notaĵon, opiniante ke ĝi tamen ne ĝustas. Nu, en ĉi tiu kazo eraroj ja estis same bonaj kiel korektaĵoj! Entute mi ricevis 30 pozitivajn raportojn el triangulo kies verticoj troviĝas en Skandinavio, Izraelio, kaj Hispanujo. En tri kazoj (Jugoslavujo, n-roj 2 kaj 3; Francujo, n-roj 11 kaj 12; Nederlando, n-roj 19 kaj 20) du homoj aŭskultis ĉe